ĜENERALA INFORMILO

N-ro 147 januaro 2008



## ZAMENHOF-FESTO.

Kiel anoncite, la 19an de decembro okazis kun granda sukceso la datreveno de Zamenhof ,ĉar pli da 20 gesamideanoj partoprenis eĉ samideano Jesús Muñoz verkis kaj legis specialan poemon, Foto fare de F. Más.

---



## 16-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO

Jes gekaruloj, la Organiza Komisiono decidis en la pasinta monato novembro la datojn kaj urbon por la 16a I E-S. Ĝi okazos en SALOU de la 4a ĝis la 11a de oktobro. Sur la foto maldekstre S. Torné, L. Serrano, Yolanda Jiménez, sekretariino de la Hotelo MEDITERRANEO, kaj F. Más. Foto fare de S. Aragaj.

**BARCELONA ESPERANTO-CENTRO**
Bassegoda, 40, 3º, 1ª
ES-08028 BARCELONA, Hispanio, Eŭropa Unio
Telefono 93 333 80 81, barcelonaesperantocentro@yahoo.es

A T O M O
Junulara Sekcio de B E-C



**La pasinta novembro okazis en Sant Cugat la "Festo de Aŭtuno"** En ĝi partoprenis la E-Asocio Josefo Angles ,dekstre la gesinjoroj Colom kaj Trini . Meritas mencii ke komence de oktobro estis organizita ĉiumerkrede senpaga Esperanto-kurso en la Kultura Domo. Pliajn informojn: 936 74 61 80.

---

## BEC-KOMUNIKOJ

**BEC ricevis la jarajn kotizojn por la jaro 2008.** S-inoj: Trinidad García, Nuria Gallés. Josefina Girona, Marta García, kaj Teresa Massana (HEM).
S-roj: Paco Crespo, Salvador Aragaj, Pere Navarro, Pere Espluga, Victor León, Gilber Santos. Pedro Vicente, Manuel López, Isidro Rovira, Jesús Muñoz, P. Andrés, José Mª Castañ kaj Juan Miras. Nome de la BEC-estraro koran dankon al ĉiuj.

---

## SUBVENCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Hispana Esperanto-Federacio elektis por la jaro 2007, nian asocion Barcelona Esperanto-Centro por ricevi la subvencion da 500 € por nia agado okaze de la stando dum la tagoj 4a-5a kaj 6a de majo en la festo FIRENTITAS 2007 en la parko "Espanya Industrial" de Barcelono.
La BEC-estraro tutkore dankas la HEF-estraron kaj precipe HEF-vicprezidantinon Lupe Sanz por ŝiaj kontaktoj kun ni , Kompreneble nia asocio daŭrigos organizante ekspoziciojn kaj standojn ĉar nia opinio estas ke la informado al la neesperantista publiko estas tre necesa.

---

## PETO DA KORESPONDADO

Kubano deziras trovi geamikojn tra la tuta mondo.Li promesas respondi ĉiujn leterojn.. **Jorge Abreu Junco**, viro, 47 jaroj, licenciulo en historio kaj teknikisto en konstruado..**Adreso**: **Serafín Sánchez 102, Cruces-57500, CFGOS CUBA**

---

## SPECIALA PETO

Samideano Manfred Kirsch, Brandstrabe 21, D-04626 Schmölln, Germanio, kolektas kovertojn kaj bildkartojn kaj fotojn pri raraj floroj de la montaro.Bonvolu kontakti .

---

**Recordando el aniversario a ZAMENHOF, y final del curso de Esperanto en Casinet de Barcelona Esperanto-Centro, el 19 de diciembre del 2007,en Barcelona.**

## EL IMPERIO DE LAS LENGUAS....

Alguien dijo.
¡Ay, de los vencidos!
y , así ha sido....
con sangre roja,
revoluciones, guerras y comflictos,
y con paces dsfrazadas,
conviven vencedores y vencidos....
al son musical,
de una lengua imperiosa y colonial....

¡Ay, de los vencidos!
en institutos, academias,
escuelas y centros oficiales.
una lengua poderosa y larga,
despacio, tentadora y seductora,
con artificiales argumentos,
se está imponiendo,
sobre sus hermanas y milenarias lenguas ....

¡Ay, de los vencidos!
perdedores y sumisos
en la Babélica carrera
por el podio de las lènguas....

Románticas, filosóficas, literarias,
poéticas etcetera, esparcidas,
desnudas y ataviadas,
de arte, ciencia, cultura y sencillez
en las vastas geografías letradas
y selváticas, sin gramática y letra,
todas son bellas, amadas y respetadas,
cuando nacen en la tierra....
cantadas, coloreadas, con símbolos y banderas....

Lenguas, lenguas milerarias,
prisioneras en bucales cavidades,
gestadas, en los archivos cerebrales....
y en los misterios de los tiempos.

Lenguas trogloditas,
de guturales sonidos,sin gramáticas, sin escritos....
Lenguas Babélicas confusas,
peregrinando a lomos de culturas,
lenguas escondidas, estáticas,
en montes y selvas ....

Lenguas flageladas y mártires,
lenguas maltratadas y prohibidas,
lenguas perseguidas y extinguidas,
lenguas olvidadas e inventadas....
todas, todas son bellas,
de un tronco nacidas,
todas son hermanas
todas son humanas
de un profundo misterio dormido....
en el lecho terráqueo, cósmico....

Y, entre el plantel fecundo de lemguas,
un hobre, sabio y soñador,
una semilla lingüística sembró,
y creció, creció la humilde semilla,
en el laberíntico plantel de lenguas....

Y, la semilla diminuta,
tomó cuerpo, se vistió,
con diccionarios, gramáticas,
libros, revistas, decorando sabiamente .
al genial cuerpo creado,
por su ilustre soñador, ZAMENHOF ....

Una lengua más,
ESPERANTO,
ingresando con amor fraternal,
en la dispersa familia de las lenguas....
ella es neutra,
de voluntad nutrida,
exenta, de belicismo lingüístico,
respetuosa y compañera,
con las lenguas maternas....

¡Ay, de los vencidos!
y sometidos
al imperio de una lengua....

A todos
unas felices fiestas;
un nuevo año brindando,
por la vida y esperanza,
del Universal ESPERANTO.

Samideano JESÚS MUÑOZ GIL

## LA 15-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO

De la 29-a de septembro ĝis la 6-a de oktobro okazis en Hispanio la 15-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo. La aranĝo okazadas regule aŭtune en hotelo, kie oni ankaŭ manĝas kaj dormas. Ĉi-foje la kataluna urbeto Tossa de Mar allogis pli ol 100 partoprenantojn el 10 landoj. La pitoreskan urbon, kun tre belaj montaraj kaj maraj pejzaĝoj, dominas kastelo ĉe la roka marbordo. Vasta strando invitas al sunumado dum agrabla aŭtuna vetero. Tiele oni plilongigas someron kiu ĉi-jare, en multaj lokoj, ne estis tre sunoplena.

La inaŭguron ĉeestis kaj bonvenigis nin la konsilanto pri kulturo, instruo kaj festoj de la urbo, s-ro Josep Colomer. Dum la du interkonaj vesperoj ni estis regalitaj per ŝaŭmvino kaj frandaĵoj. Ĉiutage okazis Esperanto-kurso kiun sprite gvidis, laŭ sia propra metodo, s-ano Miguel Gutiérrez Adúriz. S-ano A. Marco Botella prelegis pri "Eŭropo en perspektivo". Li ankaŭ estis honorita per la premio "Ada Sikorska-Fighiera" pro siaj meritoj rilate al Esperanto. D-ro Árpád Máthé el Budapeŝto prelegis kaj prezentis la laboron de Rondo "Takáĉ" omaĝe al s-anoj Luis Hernández Izal kaj Ramón Molera. Komunikada ekologio estis temo por debato kun s-ano Wolfgang Gunther. Kun Luis Serrano Pérez oni debatis pri UEA laŭ 6 proponitaj demandoj. Dum urba promeno ni vizitis lokan muzeon kaj muzeon de la lumturo ĉe la supro de la kastelo. Por transdono de memortabulo pri la evento kelkaj ĉeestis akcepton en la urbodomo kaj tostis kun la urbestrino, s-ino Imma Colom i Canal, per ŝaŭmvino.

La tuttaga ekskurso gvidis nin al la plej ampleksa fortreso en Eŭropo - "Sant Ferràn", kiu troviĝas proksime al la franca landlimo. En Besalú ni rimarkis antikvan ponton kaj ĉe la lago "Banyoles" ni tagmanĝis. Poste, en proksima loko "Aiguamolls", ni spektis en aŭditorio projekciadon pri birdoj, iliaj voĉoj kun komentario de Yves Eeckhout el Belgio. Restis tempo por promeni en la naturo kaj vidi aŭ aŭdi kelkajn birdojn en diversaj bird-observejoj. Dum ŝip-ekskurso ni laŭiris la rokojn kaj eniris kelkajn grotojn. La travidebla fundo de la ŝipo ebligis observi fiŝojn kaj aliajn marbestojn. Dum la tria ekskurso ni vizitis preĝejon en antikva urbeto "Castelló d'Ampuries" kaj bus-promenis inter kanaloj en "Ampuriabrava".

Vesperaj programoj koncernis kulturon. Ni spektis filmojn kaj operon sur vidbendoj. Certe neforgesebla estis la lasta folklora vespero kun "Grupo Habaneras Montjuich" kiu gajigis kaj regalis nin per sentimentalaj kantoj. Dume oni pretigis por ni bongustan specialaĵon "Cremat". Temas pri spicita kaj bruligita rumo, kiu instigas bonhumuron kaj dancemon. Dum la semajno funkciis libroservo, estis tempo por interbabilado, promenoj en la urbo kaj ĝuado de ties proksima plaĝo kaj maro.

Ni devas danki al sinjoroj Luis Serrano Pérez, Salvador Aragaj Galbanj kaj Santiago Tornè Grau, kiuj jam la 15-an fojon prizorgis por ni agrablan ĝuoplenan semajnon.

*Liba GABALDA*